**Dana Fervojisto estas organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)**

Prezidanto:
Jan U. Niemann
Hovedvagtsstræde 9 E, 1
DK-3000 Helsingør
tel 71 70 63 83
aŭ 71 72 32 42
niemann@kabelmail.dk

Kasisto: Karen K. Olsen
Manøvej 6
DK-4700 Næstved
tel 55 72 73 77
bankkonto (Lån&Spar)
0400 201071007539

Redaktantoj: Jan kaj Lene Niemann
Vidu adreson supre.

Preso: HVS9E1

Redaktofino por venontaj numeroj de Dana Fervojisto:

1/6-2014
1/9-2014

Enhavo:

| | |
|---|---|
| paĝo 2 | Ĝeneralkunveno |
| paĝo 3 | Abonoj 2014 |
| paĝoj 4-5 | Trakoj en Svedio |
| paĝoj 6-7 | La Trajnfonduso |
| paĝo 8 | Aktivecoj |
| paĝoj 9-10 | Temo de la jaro |
| paĝoj 11-12 | 66ª IFK |
| paĝo 13 | Forpaso |
| paĝoj 14-15 | Fervoja novaĵo |

## 66ª IFK – majo 2014




Ne forgesu … aliĝilo kaj aliaj informoj haveblas ĉe la prezidanto. Vidu ankaŭ pp. 11-12.




# Dana Fervojisto

# 1

ISSN: 1397-9914

67a jareldono

Marto 2014



***Novaj inform-ekranoj en la ĉefstacidoma halo … povas, malgraŭ ĉio, esti malfacila afero trovi la vojon!*** *Legu p. 14.*

*(fotis Jan U. Niemann)*

# Voko al DEFA ĜENERALKUNVENO 2014 - Diget 2, Køge 18/3-2014 je horo 19.00

Tagordo laŭ la leĝoj:

1. Elekto de vortgvidanto kaj protokolanto
2. Aprobo de la protokolo de pasintjara ĝeneralkunveno
3. Raportoj
   3a La prezidanto
   3b La kasisto
4. Venintaj proponoj
5. Kotizo
6. Elektoj:
   a) Prezidanto (por du jaroj)
   b) Sekretario (por du jaroj)
   c) Kasisto (por unu jaro)
   d) Unu revizoro kaj unu anstataŭanto
7. Eventualaĵoj

ad. 4)
Proponoj, kiuj estu pritraktataj de la ĝenerala kunveno, devas esti en la manoj de la prezidanto plej malfrue ok tagojn antaŭ la kunveno.

Komuna manĝo okazos je horo 18.00. Mendu ĉe Karen, kiu havas telefonnumeron 55 72 73 77.

Estu bonvena.
DEFA



## Fervoja Novaĵo

### La profito de 'kompletaj konstrulabor-ofertoj'

Jam oni havas spertojn pri tio en Danio, nome en la konstruo de la nova fervojo Kopenhago-Ringsted (parto de la Femarn-konekso). La koncepto donas eblecojn konstrui je konkurencpovaj prezoj.

Ezemplo estas 'Ofertpakaĵo 41', kiu inkluzivas entute 12 pontojn ĉe *Ishøj* kaj *Greve*. Oni faris kontrakton pri tiu tuta pakaĵo kun firmao, kiu povas libere pritrakti la taskon kaj mem trovi solvojn, se ili nur sekvas la 'kadrojn', kiujn donis la mendanto de la konstulaboro – en tiu kazo *Banedanmark* – ŝtata firmao, kiu repondecas pri infrastrukturo ĉe la fervojoj.



La firmao, kiu 'havas' la kontrakton, tiel elektis plurajn solvojn, kiujn oni ne multe uzis antaŭe en Danio, sed la elekto baziĝas je spertoj ĉe fervoj-konstrulaboroj plurloke en Eŭropo.


Kompreneble ĉio okazas en intima kunlaboro kun la Teknika Fako de *Banedanmark*, kaj ĉiuj elektitaj solvoj devas esti akceptitaj ankaŭ (kaj ne malplej) je sekureca vidpunkto de diversaj instancoj, sed la koncepto donas finfine pli bonan rezulton, diras reprezentanto de *Banedanmark*.

Fonto: *Baneavisen* novembro 2013

## Fervoja Novaĵo (fonto: *BaneAvisen*, decembro 2013)

**Komunaj klientoj, komunaj trafikinformoj ...**
Ĉiuj spertoj rakontas, ke la pasaĝeroj ne pensas tro multe pri la diversaj ekspluantoj, per kiuj ili faras siajn ĉiutagajn vojaĝojn. Ili pensas pri ĝustatempeco, bonaj koneksoj kaj komforto.

La nova kunlabora organizaĵo *TUS* (Trafikinforma Esplor-Kunlaboro) kreita inter la ekspluantoj en la ĉefurba regiono nun per komuna datumbanko kaj komunaj inform-ekranoj povas informi pri 'la tuta vojaĝo' ... per buso, metroo kaj trajno.




Komence oni provinstalas ekranojn en la kopenhaga ĉefstacidomo (la foto *(Jan U. Niemann)*), en *Nørreport* stacidomo kaj en *Flintholm* stacidomo – en tiuj lokoj S-trajnoj, metroo kaj busoj servas.

Oni esperas, ke oni povas eluzi la komunajn kaj kolektivajn informojn je la bono de ĉiuj.






# Abonoj 2014

**Karaj abonantoj de Dana Fervojisto / IF,**

ni ne plu havas ĝirkonton, kaj pro tio ni tiumaniere informas vin, ke nun estas tempo pagi al la DEFA-bankkonto la abonprezon de Dana Fervojisto / IF por 2014:

**DF 40 DKK**
**DK kaj IF 60 DKK**

Bonvolu pagi al kontnumero

**0400 – 107 10 07539 (Lån&Spar)**

kaj indiku, kiu(j)n bulteno(j)n vi abonas por 2014, kaj vian nomon. La pago okazu antaŭ la 1a de aprilo 2014.

Kun antaŭdanko – la kasisto.

## Problemoj pri trakoj en Svedio

En la nokto 7.-8. de januaro 2014 dereliĝis trajno en *Huddinge* apud Stokholmo. La trajno portis pakaĵojn kaj poŝtaĵojn. Neniu homo vundiĝis.




Estis la 43a problemo pri trakforko sur tiu specifa itinero depost 2008. Spertuloj diras, ke la trakaro ĉirkaŭ Stokholmo (kaj ankaŭ aliloke) estas eluzita kaj malbone bontenata, kaj ŝajne ne helpas, ke oni informas al la respondeca instanco *Trafikverket* pri problemoj.

La 13an de decembro 2013 lokomotivestro informis pri problemo kun la trakforko, kie okazis la akcidento en januaro, sed *Trafikverket* diras, ke ne estis urĝa, kaj ke ne povas esti tiu defekto, kiu kaŭzis la akcidenton en januaro.

Tamen i.a. trafikesploristoj kaj reprezentantoj de la sindikato *SEKO* diras, ke la demando ne estas, ĈU okazos akcidento de pasaĝertrajno. La demando estas KIE kaj KIAM.

Plej verŝajne estas pli 'ĝenerala' problemo, ke tiuj, kiuj respondecas pri



## Bona amikino de multaj DEFA-anoj forpasis.

*Gertrud Eggenberger*, kiun multaj el ni pli bone konas sub la nomo TRUDI, forpasis pace kaj trankvile en Winterthur 19/2-2014 kun siaj familianoj ĉirkaŭ si.

Trudi estis famkonata en IFEF kaj ankaŭ en FISAIC, kaj ŝi dum jardekoj multege kaj nelacigeble laboris por esperanto.



Trudi kun amikoj en 2011

Ni konas ŝin nun multajn jarojn kaj ĝuis la varman amikecon kaj ĉiaman gastamon ĉe Trudi. Plej laste ŝi estis devigita translokiĝi en fleghejmon, ĉar Parkinson-malsano suficê ĝenis ŝin. Sed – ŝiaj humoro, vigleco kaj obstino ĉiam regis, kaj neniam ŝi lasis al la malsano stiri sian vivon ... kontraŭe, ŝi ĉiam kun vervo kaj energio klopodis mem majstri, kaj tiun sintenon oni povas nur admiri.

Ni ĝojas, ke ni havis la ŝancon koni Trudi, kaj ni dankas prio multaj belaj memoroj.

Niaj pensoj iras al la familio kun dankemo.

Jan & Lene



*Loreta*

**Palpi vizaĝojn, korpojn, gestojn, esprimojn; malkovri volumenojn kaj perspektivojn pere de siaj manoj.**

La Ŝtata Palpsenta Muzeo Omero naskiĝis kun la celo plenigi tiun mankon en la panoramo de la kulturaj servoj por la nevidantoj, sed ankaŭ por disponigi novkonceptan medion, kie la arta perceptado efektiviĝas tra nevidaj plursensaj sugestioj.

Percepta vojo malpermesata de preskaŭ ĉiuj muzeoj, alproksimiĝo al estetiko grandparte ĝis nun neesplorita de la nevidantoj, malgraŭ ĝia profunda epistemologia valoro. Ekzistas tamen en Italio muzeo, kiu elektis la palp-esploradon kiel ĉefan kanalon de kono.

## Antaŭĝoju partopreni!



bontenado, ne estas tiuj, kiuj veturas sur la reloj, kaj la kompreno de la vorto 'problemo' estas diversa inter la du grupoj. Tiun fenomenon oni konas ankaŭ de aliaj landoj ol Svedio.




Ankaŭ la redaktoro de *TÅG*, la bulteno de la sveda fervojklubo, komentas la aferon. En sia ĉefartikolo de la januara numero li miras pri la agmaniero de la ekspluatanto de la sveda relaro, *Tågverket*. Oni ĉesigas (portempe) trafikon sur kelkaj linioj, limigas la trafikon sur aliaj, kaj oni ne agas laŭ la informoj, kiujn donas lokomotivestroj survoje – ekzemple en la kazo de trakforko 101 ĉe *Huddinge*. Samtempe *Tågverket* asertas, ke la svedaj itineroj estas bonaj kaj sekuraj. En la sama numero de la bulteo estas sufiĉe ampleksa resumo de la okazaĵo ĉe trakforko 101. Lokomotivestro de pasaĝertrajno telefonis al la trafikregejo, ke 'estis stranga kaj forta sono ĉe trakforko 101'. Li pensis, ke estas biciklo, kaj petis, ke oni esploru tion. Mallonge poste li denove telefonis, ke ankaŭ la trajnpersonaro forte sentis tion – eĉ ili sentis skuon en la vagonoj. Tamen la regejo nenion faris, kaj la venonta trajno, kiu preterpasis la trakforkon, dereliĝis. Feliĉe tiu trajno ne portis pasaĝerojn.

Fontoj: *BaneAvisen*, februaro 2014, *TÅG*, januaro 2014

## La Trajnfonduso – *TOGFONDEN DK*

Post principa decido pri grandioza investo en publika transporto en marto pasintjare finfine meze de januaro 2014 plimulto de la dana parlamento *Folkertinget* faris kontrakton pri uzo de la entute 23.3 mia. DKK (ĉ. 3.12 mia. EUR).- En 2024 oni reprilaboru la evoluon kaj la staton de la projekto kaj decidu pri la restantaj 5.2 mia. DKK (0.70 mia. EUR) de la tuta investo, kiu estas 28.5 mia. .

La entute 28.5 mia. DKK (3.82 mia. EUR), do la financado de la tuto, venu de impoŝto de la oleo- kaj gasproduktado en la Norda Maro.

El la 23.3 mia. DKK la 6.6. estas 'rezervoj' por survojaj rekalkuloj de la multaj part-projektoj.

Nova afero, kiu ne estis en la skiza projekto de marto 2013, estas fervoja konekso inter *Velje* kaj *Billund*.




*Billund* estas grava urbo pro du aferoj:

- flughaveno, de kie multaj (precipe ĉart-) aviadiloj foriras kaj alvenas; Fuenon kaj Jutlandon servas tiu flughaveno, dum enloĝantojn en Selando servas la flughaveno en Kastrup
- *Legoland*, la mondfama plezurparko de la danaj ludil-brikoj



Pri la 66° IFK en San Benedetto del Tronto la retpaĝaro informas:

## *Pri la tuttaga ekskurso*

### Loreto - Castelfidardo - Recanati - vizito al la Muzeo Omero en Ancona

**LORETO** staras sur supro de monteto, parte ĉirkaŭita de muroj kaj bastionoj de la deksesa jarcento, kun la plej granda Mariana sanktejo en Italio. Laŭ la legendo, la Domo de Nazareto estis forportita de la anĝeloj por eskapi la invadon de Palestino fare de la Maometanoj. En la Baziliko laboris kelkaj el la pli ilustraj artistoj de la Renesanco, inter ili Signorelli, Melozzo da Forlì, Bramante kaj Lotto. En la okcidenta brako de la Apostola Palaco oni povas viziti la Muzeon kaj la Artgalerion de la Sankta Domo.

Irante laŭ norda direkto, jen **CASTELFIDARDO**, la ĉefurbo de la akordiono, instrumento al kiu estas dediĉita interesa muzeo, tie ĉi okazis la fama batalo kiu ekis la Unuiĝon de Italio dokumentita en ĝia muzeo.

Daŭrigante al **RECANATI**, naskiĝloko de Giacomo Leopardi, por promeni inter la lokoj karaj al la poeto: la placo kaj la monumento dediĉita al li, la memoroj konservataj en la Urbodomo, la placo de la "Sabato de la Vilaĝo" kaj la "Turo de la Soleca Pasero". Palaco Leopardi, naskiĝloko de la poeto kaj la apuda Nacia Centro de Studoj Leopardiani enkondukas al la Monteto de la "Infinito" kie estas skulptita la unua verso de la fama idilio:"Mi ĉiam amis tiun monteton." Vizitindaj estas la urba Muzeo, en vilao Colloredo Mels kiu havas grandajn verkojn, inter kiuj kvar gravajn pentraĵojn de Lorenzo Lotto, la Muzeo "Beniamino Gigli", gastigata en la premisoj de la Teatro Persiani, kun fotoj, personaj instrumentoj, dokumentoj kaj scen-kostumoj de la fama opero-kantisto, kaj la Dioceza Muzeo en la Episcopio.



Du privatuloj ekhavis la ideon ĉ. 1990 fari tian monumenton, kaj ili batalis dum kvin jaroj por kolekti monon. Ili rapide trovis la artiston, al kiu ili deziris demandi fari la skulptaĵon: *Gudrun Steen-Andersen*, kiu faris plurajn aliajn artaĵojn en 'la publika areo'; oni vidas artaĵon de ŝi i.a. antaŭ la Koncertejo (*Musikhuset*) en Aarhus. Ŝi akceptis la inviton … sed kiam oni petas monon de fondaĵoj, plej ofte ili deziras mem decidi pri la artisto; pro tio oni nenion ricevis.

Sed la *Hadsten*-anoj ne perdis la esperon. Oni okazigis en 1992 urban feston, dum kiu oni prezentis modelon de la eventuala skulptaĵo, kaj post tio DSB, la komunumo, entreprenoj kaj privatuloj subtenis la aferon finance kaj praktike – iu firmao loka ofertis fosi por la fundamento, alia faris la fundamenton, kaj tria veturigis la krudan skulptaĵon al Italio, kie ĝi estis bronzita.

Dum aŭtuna tago en 1994 oni festene inaŭguris la skulptaĵon, kiu havas la nomon *Banebørster* – la nomo, kiun oni karese/respektoplene donis al tiuj grupoj de vojaĝantaj konstrulaboristoj, kiuj sekvis la preparon kaj faradon de novaj fervojlinioj.

Unu el la iniciantoj faris poemon por la inaŭgura tago, kaj unu el la strofoj tekstas:

Nur per muskola forto
estis farita 'la longa fervojo' de Jutlando.
La viroj, kiuj faris tiun
aĉan, streĉan kaj laciga laboron –
ilin oni nomis *Banebørster*

Mi povas aldoni, ke *Gudrun Steen-Andersen* en la kreiva laborprocezo vizitis mian patron (fervojlaboristo 1944-1984), por ke li klarigu al ŝi pri iloj kaj labormetodoj. Bedaŭrinde li mortis antaŭ la inaŭguro kaj neniam vidis la finan rezulton.

LN

Fonto: *e-avis.favrskovavisen.dk*, 06/11-2012



La nova fervojo kompreneble havos haltejojn ambaŭloke.

Pri tiu part-projekto oni ankoraŭ ne findiskutis, kaj ĝis aprilo 2014 la transportministerio kunlabore kun lokaj instancoj, entreprenoj kaj unuopaj personoj faros skizon pri itinero, fervojo kontraŭ tramvojo, ekonomio ktp. La partoj malantaŭ la trajnfiondusa kontrakto poste prilaboros tion.

Pliajn informojn serĉu ĉi-tie:
http://www.trm.dk/da/publikationer/2014/aftale+om+togfond/

LN




**Jarkunveno de DEA** (Dana Esperanto-Asocio) okazos 26.-27. de aprilo, kaj kiel kutime ni instigas al DEFA-anoj partopreni. Por informoj kaj aliĝo, turnu vin al la asocio rete dea@esperanto.dk , aŭ al la DEFA-prezidanto *Jan U. Niemann*, tel. 71 70 63 83.

## Aktivecoj de DEFA:

Dum la vintro ni kunvenas unufoje monate. La kunvenoj okazas en Køge ĉe Astrid kaj Erik aŭ en Næstved ĉe Karen. Ni renkontiĝas je la 18-a horo, kune manĝas, pritraktas taskojn, kiujn sendas Heinz Hoffmann pri terminologiaj aferoj, kaj ni strebas fari artikolojn por IF kaj Dana Fervojisto kaj prezentojn por la venonta fervojista kongreso.

Ni kunvenos la

18an de marto (ĝeneralkunveno)

8an de aprilo (preparo de prelegeto por la 66a IFK)

Por pliaj informoj kaj aliĝo, turnu vin al la prezidanto.

La anoncita ekskurso: Bedaŭrinde ni devis pro diversaj kialoj prokrasti la planitan ekskurson ĝis somere aŭ aŭtune. Vi aŭdos pri tio poste.

## Aliaj Esperanto-aktivecoj en Danio:

**Kopenhago**

***Kunvenoj de KEK*** (prezidanto: Peter Wraae, tel 46 49 60 16, retadreso kek@esperanto.dk) okazas en Kulturhuset, Tomsgårdsvej 35, 2400 Kbh NV. Vidu ankaŭ www.esperanto.dk

**Århus**

***Kontaktulo pri DEFA*:** La prezidanto.
Kunvenoj okazas kunlabore kun la Esperantoklubo de Århus en Folkestedet, Carl Blochs Gade 28, 1ª etaĝo, salono 7, je h 19.30, la lastan ĵaŭdon de la monato.



## Temo de la jaro

Kiel kutime ni volas provi fari por ĉiu numero de Dana Fervojisto 'tem-artikolon' laŭ temo elektita de la redaktantoj – sen ia demotratia principo, tute laŭ nia gusto.

Jen la temo: **'Fervojo kaj la belaj artoj'**
Ĉiuj el vi certe multfoje vidis pentraĵon kaj skulptaĵon kaj aŭdis muzikon kun 'fervoja temo'. Ni volas en la kvar artikoloj – unu por ĉiu 2014-a numero – priskribi artaĵojn, en kiuj fervojo (pli-malpli) rolas.

Kompreneble ekzistas multaj artaĵoj en diversaj landoj, sed ni elektis Danion ... kaj surprize multe ekzistas por rakonti.

## Skulptaĵoj



*Gudrun Steen-Andersen: 'Banebørster'*, antaŭ la stacidomo de Hadsten

Tuj apud la nova stacidomo en la jutlanda urbo Hadsten vi trovas bronzan statuon de du fervojistoj, kiuj per ŝpalonajloj kunmetas relojn al ŝpalo. La statuo estas honorigo al la laboristoj, kiuj metis la relojn, por ke la fervojo kaj per ĝi prospero kaj sukceso venu al la urbo kaj al tuta orienta Jutlando en la 1880-aj jaroj.